Por ĉiutagaj informoj, eventoj kaj interesaj enhavoj, sekvu ankaŭ nian paĝon ĉe Facebook kaj Twitter.

**445 | Marto 2018**

Ĉu vi ne vidas ĝuste la mesaĝon? Rigardu ĝin en via retumilo.

tejo:aktuale

## TEJO partoprenos la Eŭropan Junularan Okazaĵon en Strasburgo

La 1-an kaj 2-an de junio 2018, TEJO partoprenos la **Eŭropan Junularan Okazaĵon – European Youth Event** en Strasburgo, kun delegacio de preskaŭ 30 junaj Esperantistoj.

Sekvo de la rakonto ĉi tie.



---

## Iĝu TEJO-volontulo en la Centra Oficejo en Roterdamo (2018-2019)

Kadre de la **Eŭropa Volontula Servo**, TEJO (Tutmonda Esperantista Junulara Organizo) invitas vin por iĝi plentempa **TEJO-volontulo** en la **Centra Oficejo en Roterdamo**.

Kandidatiĝu ĝis la 31-a de marto! Pliaj detaloj [ĉe nia retpaĝaro](#).




---

## Nova numero de Revuo Kontakto: Pluramemo – Novaj difinoj kaj defioj en amrilatoj

La nova numero de **Revuo Kontakto** ĵus aperis en la reto! La ĉeftemo de la numero estas **Pluramemo.**

Enkonduko de la redaktoro, kaj ligilo al elektronika versio por abonantoj troveblas ĉe nia retpaĝaro.




---

# Kampanjo de UNITED
# Diverseco: neniam tro!

***17-25an de marto – Eŭropa Agadsemajno Kontraŭ Rasismo 2018***

**UNITED** estas Eŭropa reto de junularaj organizoj, en kiu ankaŭ membras TEJO: jen mesaĝo kiun UNITED sendis al ĉiuj siaj partneraj organizoj pri sia marta kampanjo kontraŭ rasismo.




## Venontaj Eventoj

- 28-an de Marto - 03-an de Aprilo - Internacia Junulara Festivalo en Marina di Ascea (SA), **Italio**
- 31-an de Marto - 05-an de Aprilo, Tendumado kun la Verdaj Skoltoj, Herzberg, **Germanio**
- 13 - 17-an de Aprilo - Brita kaj Tutkelta Kongreso en Aberystwyth, **Britio**
- 20 - 27-an de Aprilo - PRINTEMPaS en la Kastelo Greziljono, **Francio**
- 27 - 29-an de Aprilo - 1-a Kunveno de Sudorientazia Junularo - Ayutthaya, **Tajlando**
- 28-an de Aprilo - 1-a de Majo - Krokodila renkontiĝo en Tuluzo, **Francio**
- 28-an de Aprilo - 1-a de Majo - 5-a Centrejo, Žďár nad Sázavou, **Ĉeĥio**
- 1 - 5-an de Majo - Mirinda Lviv en Lviv, **Ukrainio**
- 14 - 22-an de Julio 2018 - Somera Esperanta Studado en Liptovský Mikuláš, **Slovakio**
- 4 - 11-an de Aŭgusto 2018 - IJK 2018 en Badajoz, **Hispanio**




## IJF 2018 baldaŭ okazas!

**IJF – Internacia Junulara Festivalo 2018** okazos en Marina di Ascea (provinco de Salerno, Kampanio, Italio) de la **28-a de marto ĝis la 3-a de aprilo**.

La aliĝilon vi trovos en la oficiala retejo de la evento.

## Kastelo Greziljono Programo 2018

Retrovu la plenan programon de la **kastelo Greziljono en Francio** por la jaro 2018: kursoj kaj ekzamenoj, eventoj kaj festoj, ktp.




## Kolofono

*TEJO Aktuale* estas retpoŝta informilo de TEJO. Ĝi estas senpage abonebla, aperas 1 foje monate kaj koncize kompilas freŝajn, konkretajn informojn pri la junulara E-movado kaj ligilojn al interesaj retpaĝoj – pli rapide ol povus tion fari paperaj revuoj.

**Redaktoro:** Gilbert Niyukuri
**Kontribuanto de ĉi tiu numero:** Paul Helly, Ariel Palmer

**Eldonas:** Tutmonda Esperantista Junulara Organizo (TEJO), tejo.org

*Kopirajto © 2018 TEJO*

*Ĉi tiu laboro disponeblas laŭ la permesilo Krea Komunaĵo Atribuite-Samkondiĉe 4.0 Tutmonda*

Ĉu vi volas ŝanĝi kiel ricevi ĉi tiujn retpoŝtajn mesaĝojn?
Vi povas ĝisdatigi viajn agordojn aŭ malaboni vin de ĉi retpoŝta bulteno